Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Septembro - Oktobro 2015 | n-ro 09–10 (1323-1324)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Ju pli da militoj...













# ...des pli da rifuĝintoj.

Мир Ειρήνη Rauha
Paix 平和 Síochάin 和平
Paz **PACO** Sìth
שלום السلام
평화 PER ESPERANTO Fred
Sülh สันติภาพ Peace Pé Pace Pokój Paqe

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Rifuĝintoj, jam de longe kronika, kaj kutime neglektata, malsano de nia socio, subite fariĝis laŭmoda ĉieestantaĵo. La bonaj intencoj de niaj registaroj kaj ties amaskomunikiloj estas dubindaj. Sed la tragedio de tiu amaso da homoj fuĝantaj el teruraj vivkondiĉoj estas realaĵo bezonanta solidaran reagon. Kontribuoj por nia revuo pritraktantaj ĉi temon estas aparte bonvenaj.

Unu el la nuntempe precipaj fuĝo-areoj estas Mezoriento, aparte Sirio. Ĉi tie, konkrete en la kurda regiono, disvolviĝas alitipa reago de la popolo : anstataŭ fuĝi, ĝi organiziĝas kaj kontraŭbatalas sindefende. Denove ĉi-numere nia revuo alportas informojn pri tiu ĉi heroaĵo.

Niaj registoj alpublike hipokrite ploras kaj, samtempe, sendas armilojn al konflikto-regionoj permesantan la akriĝon de la militoj, kiuj generas rifuĝintojn. Sed ni ja kontraŭbatalas surloke la militon, kiel faras aktivuloj en Japanio, ankaŭ beletre, kiel montras la publikigita rakonto.

Aparte bone nutrataj ĉi-numere estas la rubrikoj beletra, media kaj, kompreneble, tiu rilatanta al la ĵus pasinta kongreso. Memoru, kara leganto, ke Sennaciulo estas via revuo. Vi faras ĝin per viaj kontribuoj. Ni ĉiuj, malsamideanoj, kunkreskas per konstanta interŝanĝo de vidpunktoj, spertoj kaj opinioj. Ne hezitu alporti la viajn.

Ni esperas ke la legado de la revuo estu agadveka inspir-fonto. Tion deziras al vi :

La Redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Venontaj limdatoj

Sennacieca Revuo 2016: 31a de decembro 2015

Sennaciulo 1-2 (1326-1327): 30a de novembro

Sennaciulo 3-4 (1328-1329): 20a de januaro

### Atentigo pri kotizpago

Kiel anoncite en pasinta numero, ekde la 1-a de aprilo la kasisto de SAT estas Bruno HENRY. Do ĉiujn demandojn rilatajn al kotizpagoj kaj ceteraj financaj aferoj bonvolu direkti laŭeble al li tra la retadreso esperanto.bhenry@yahoo.fr. Paperajn korespondaĵojn sendu al la sidejo de SAT.

## Enhavo

Enhavo


### Kongresaj raportoj
4 La 88-a SAT-Kongreso Liba GABALDA
5 Lernigoj de ies unua kongreso Paŭĉjo LIJVRET
6 Gvidrezolucio kaj Deklaracio
7 Resumo pri kongresaj laborkunsidoj

### Socio
10 La alia batalo de la kurdaj virinoj Nada MAUCOURANT
12 La glavo de Erdogan por la balotado NXC
13 Roĵavo: lukto kun liberecana substrato NXC
15 Komunikaĵo de la NKL-ILA NXC
16 Letero el Kubo José Luis MONTES DE OCA
Pri la ekonomia-komerca blokado al Kubo José Luis MONTES DE OCA

### Medio
17 La agroekologio, kiel produktado-modelo Robin' BETO
Sep miliardoj da revoj Wolfgang GUENTHER
18 Liono-Torino, ĉu estas unu plia Granda Senutila Projekto? Esperanto Vive, Ĉamberio
19 Argumentaro LIONO-TORINO (resumo) Esperanto Vive, Ĉamberio

### Intelekta memdefendo
20 Pri la nocio de certeco R. PLATTEAU

### Beletra angulo
21 Dediĉe al Vladimir Majakovskij Espopore
Konatiĝu : Vladimir Majakovskij, proleta poeto Espopore
22 Nemalhavebla por la mondo - José Martí Fernando A. PAREDES
23 La nokta operacio Roger CONDON

### KoKino
25 Ouroboros Ricardo BIURRUN

### Liberecana frakcio
26 Barcelona semajno pri Esperanto kaj la liberecana movado (2-a parto) Miguel FERNÁNDEZ

### SAT-anoj aktivas
28 Knabino iniciatis manifestacion kontraŭ milito en Sapporo, Japanio MIYAZAWA Naoto
29 Manifestacio kontraŭ la militopreparleĝoj en Sapporo MIYAZAWA Naoto

### Tra Esperantio
29 Rezolucio de ILEI Mirelle GROSJEAN

### El la SAT-Administrejo
30 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Preseraroj | Donacoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***